# *Havana felietono: survoje al la 500-a jubileo*



La kuba ekonomio havas inter siaj ?efaj industrioj, la nomatan industrion sen kamentuboj, tio estas, turismo, kiu  serioze alcelas la nombron de 5 milionoj da vizitantoj en tiu ?i jaro.

La insulo havas 70 mil 879 ?ambrojn en hoteloj, el kiuj 12 mil 488 estas en Havano. Kial? ?ar precize la ?efurbo allogas multajn vizitantojn sojle al sia 500-a jubileo.

Tiu ?i festo okazos la 16an de novembro  kaj pro tio diversaj planoj ekzistas flanke de la ministerio de turismo, kiu preparas 610 projektojn jam anoncitaj ?is la jaro 2030.

Tiuj projektoj kreos pli ol 100 mil ?ambrojn en hoteloj; krome estos centroj por amuzado, ?ambroj por entreprenoj ligitaj al turismo, aliaj 50 projektoj por turismo de naturo, interalie. Havano posedas aparte 136 projektojn, el kiuj 60 estas kun fremdaj investoj kaj 76 propraj.

La funkciuloj de la sektoro asertas ke, en la kazo de Havano ?iuj projektoj rilatas  ne nur al la malnova urbocentro, ege alloga,  sed anka? al la ceteraj distriktoj dde la urbo.

Kiam oni trairas la stratojn de la urbo, eblas vidi kaj a?skulti plurajn turistojn kiuj afable klarigas ke ili sentas sin tre ?ojaj kaj sekuraj promentante tra la urbo, ?uante la afablecon de la kubanoj, ?iam malfermaj kaj helpemaj.

Spite al pluraj obstakloj starigataj de la usona sie?o komerca, ekonomia kaj financa kontrau Kubo, la turisma sektoro estas promesplena kaj laboras kun bonaj kreskoceloj por 2019.

La plano  atingi la nombron de 5 milionoj da vizitantoj,  reprezentas 7 elcenton je kresko kaj 17 elcento rilte la enspezojn pro tiu ?i koncepto.

En sia 500-a fondodatreveno Havano sin preparas por bonvenigi la jubilean  feston kaj vizitantojn el la tuta mondo.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/de-interes/caleidoscopio/181926-havana-felietono-survoje-al-la-500-a-jubileo

**Radio Habana Cuba**